# BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO-INSTITUTO

**Albana proverbo:** La braveco post la milito kaj la sag'eco post la kunveno ne plu valoras ( Shkodër)

**Nr 55 Oktobro 2004**

**Adreso: p/o Bardhyl Selimi Rr. Maliq Muço P.50 A.3 Tiranë Albanio**
**Telefonoj: +355 4 241272 (Vasil, prezidanto); +355 4 238 558; ++355 68 25 80 758 (Bardhyl , sekretario); +355 4 363360 (Rita , kasistino)**

**Rete:** pistolia@yahoo.com , apistoli@aol.com (Vasil Pistoli); selimib@albmail.com (Bardhyl Selimi); adoci@gmx.de (Artur Doçi) ; shhasani@albmail.com (Shaban Hasani); motto@bwc.org (Martha Otto) **; fiorialbtours@yahoo.com (Fjoralba Sadiku); asokoli@bkursimeve.com.al Nehat Sokoli;** beqirajs@hotmail.com (Saimir Beqiraj) ; matildasokoli@yahoo.com (Matilda Sokoli); a_myrazi@yahoo.com (Ariel Myrazi); sambeg2000@yahoo.com (Saimir Begollari); dpermeti@amc.al (Rita Përmeti); (mgumeni@lincoln.org.al (Jon Gumeni); ereid@wp.pl (Ereid Dhimitri); dritanxhindole@hotmail.com (Dritan Xhindole); ervincanga@yahoo.com ; egli_b@wp.pl (Egli Brati) ; eltonzaimi78@yahoo.com (Elton Zaimi); agimperaj@yahoo.it ;

**Retpag'o** : http://www.esperantio.tk

You can access the group's web features using the link below.
http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/

You can access the group's Management page using the link below.
http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/manage

**ENHAVO**
**Esperanto kursoj**
Baldau' nova lernokurso
Kie okazas kursoj
Nova lernolibro por albanoj
**Ekzamenoj**
Sukcesis
**Vortaro granda albana –esperanta**
Ĝis nun 6000 vortoj!
**Esperanto movado**
Invito
Libroj-La dang'era lingvo de Ulrich Lins

**<u>Vojag'impresoj</u>**
Boris Kolker
Elda Doerfler
Eu'ropa vojag'o
<u>UEK-Pekino</u>
Nova estraro
Pekina Deklaro
Prelego
14° IEK
**<u>El la diplomlaboraj'oj de niaj gestudentoj</u>**

**<u>Esperanto-kursoj</u>**

**Baldau' nova lernokurso**
Ene de unua duono de oktobro 2004 malfermig'os nova lernokurso en la blindulejo de Tirana. Tia kurso okazis jam tie en la jaroj 2001 kaj 2002, sed c'esis funkcii en la jaro 2003. Nun, lau'konsentite kun la lernejestro, s-ino Hazbie Rama, baldau' rekomencig'os la lernokurso de E. kun grupo miksa el 15 personoj de gelernantoj el tiu blindulejo.
**Rita Permeti**

**KIE OKAZAS ESPERANTO-KURSOJ?**

Per pasho post pasho progresas Esperantujo - kaj grandan kontribuon liveras la Esperanto-instruistoj. Por pli bone videbligi ilian laboron kaj helpi al interesighantoj pri Esperanto, EsperantoLand jhus pretigis tutmondan maparon pri Esperanto-kursoj, www.esperantoland.org/kursoj . La Esperanto-kursoj lauloke aperas sur diversaj mapoj; detalajn informojn oni ricevas sur unuopaj prezentopaghoj. Chiu ajn povas aldoni informojn pri pliaj Esperanto-kursoj lau la modelo de la jam ekzistantaj maparoj che EsperantoLand.org, kiuj informas pri pli ol cent estontaj Esperanto-renkontighoj kaj chirkau 250 Esperanto-grupoj en la tuta mondo. La maparo estighis lau instigo de Germana Esperanto-Junularo, kiu celas plibonigi la informan laboron. La intenco estas plifaciligi la lauregionan serchadon de kursoj kaj tiel komplementigi jam ekzistantajn retejojn.

**BALDAU' NOVA LERNOLIBRO POR ALBANOJ**
Baldau' aperos nova lernolibro de Esperanto por albanoj verkita de Bardhyl Selimi. G'i enhavos 20 lecionoj kaj selektitat dulingvan vortareton albana-esperanta kaj esperanta albana. Tiel oni plenogos vakuon estig'anta post la elc'erpig'o de du aliaj lernolibroj eldonitaj tuj post la jaro 1990 respektive de Doc. Vasil Pistoli (1991) kaj Zef Mjeda (1993) kaj alia plilarg'igita s'losilo fare de Agim Peraj pli poste.
**Shaban Hasani**

**Nova Vento en Benino, 2004**.

En Benino okazas cxiu jaro premio-tago en lernejoj entrudigxas esperanto. Estas lauxtradicie rimarkinda, ke je la fino de cxiu lerno-jaro oni disdonas premiojn al lernantoj. La premioj konsistas el cxiuspecaj donacoj senditaj de esperantistoj el

Auxstralio-Euxropo-Usono,... Denove tiun cxi lerno-jaro okazis la premio-tago en la lernejo Aguidahoue, fora vilagxo de Lokossa. Modestaj estas la premioj sed gxojiigindaj.

La 31an de julio 2004,hierauxon de benina sendependa festotago, okazis la cxi-jara premio-tago en la lernejo Aguidahoue, en kiu agadas **Esperanto-Projekto Interkulturo(E.P.I).** Multaj lernantoj ricevis belan krajonon-skribilon-bildkarton-skrapgumon-pasxtelon kaj posxkalendaron. Aldone al tio iuj lernantoj ricevis konforme al la klasrezulto etajn kaucukajn pilketojn-vestajxojn- notfoliarojn-posxhorlogxojn-monujojn-liniilojn-pupojn. Cxi tiuj menciitaj donacoj cxefe senditaj de Doroteo Holland(Esperanto-Rondeto de Santa Barbara)-de Agnes Geelen(Belgio)-de Madeleine Crepatte(Francio)-de Hans Bakker(Nederlando)-Jennifer Bishop(Auxstralio)-de Jean-Yves Santerre(Francio)- de Roland Larsson(Svede). Kajeroj estas aparte donacitaj al la lernantoj,kiuj sukcesis la finlernejan ekzamenon por atingi la kolegion. Kajeroj venis de "Imprimerie Tunde S.A(Benino)- de Jennifer Bishop. Notindas dauxre mencii la sencxesan sendadon de gazetoj de Françoise Goetz(Francio) kaj libretoj de Jean-yves Santerre. Tio ebligis,ke E.P.I starigos egan bibliotekon por la lernantoj en la lernejo.

Malgraux la ne suficxaj donacoj cxi-jare, E.P.I kontribuis la venontan premio-tagon en la lernejo Jules Verstraeten de Kogxi disponigante al la tiea lernantoj kajerojn-skribilojn-krajonojn-gazetojn kaj skrapgumojn. Korektiloj -insignoj kaj sakoj( senditaj de jean -Yves Santerre, Hans Bakker) donacitaj al la instruistoj,kiuj partoprenis la okazintan seminarion de E.P.I en la lernejo Aguidahoue(http://esperanto-vorpommern.de) .

Pro la tre bela disponigita trofeo de Agnes Geelen al E.P.I, tiu lasta estas organizanta turniron inter la lernejoj: Aguidahoue-Kogxi kaj Adame. Gxi okazos la lernejan jarrevenon(oktobre). La venkinto gajnos la trofeon. Ni insiste petas la helpon de unuj kaj la aliaj por bone preparadi cxi tiun turniron.

La premio-tagon cxeestas la esperantoinstruisto(Houenavo Pierre) de Jules Verstraeten de Kogxi kaj du aktivaj esperantistoj de "Egaleco".

Lauxdon kaj dankon al ambaux gesamideanoj,kiuj pensis pri la lernantoj de E.P.I sendante donacojn por instigi la lernantojn utiligi la lingvon. Ni aparte dankas Rosa EBEL pro sxia anonco en "NUN" pri la premio-tago.

E.P.I multe bedauxris la perdposxtleteron de nia mecenato,Gunter Ebert(Germanio). Ni kaptas la okazon por atentigi cxiujn bonvolemulojn ,ke la donaco-mono povas atingi E.P.I per la jena **UEA konto:hufs-j** por eviti la eventualajn perdojn cxe la posxtoficejoj kaj konfuzojn inter la donacantoj kaj la gvidanto de E.P.I.

Por pliaj informoj kaj subteno, bonvolu direkti vin al:
François HOUNSOUNOU,
BP 226 Lokossa-Mono
Rép du Bénin.
Afriko.
http://www.iespana.es/Esperanto_es/benino

http://storm.prohosting.com/jesuo/k54lako.htm
http://storm.prohosting.com/jesuo/k55benin.htm
http://esperanto-vorpommern.de .
Raportis: Gvidanto de E.P.I, François HOUNSOUNOU.

**Ekzamenoj**

**Sukcesis..**
**Karaj gekolegoj,**

Nome de la ekzamenofico de AIS mi havas la g^ojon kaj honoron informi vin, ke dum SUS 27 - okazinta en Komarno (SK) de 2004-08-26 g^is 2004-09-06 - 19 kandidatoj sukcese trapasis la finan ekzamenon c^e AIS.

La sukcesaj kandidatoj estis:

A) Dr. sc. cyb.:

1) Ljubis^a PRERADOVIC^ (BA)
2) Josef VOJAC^EK (CZ)

B) Mag. sc. cyb.

3) Viliam BUR (SK)

C) Mag. sc. hum.

4) Sebastian HOFFMANN (DE)

D) Mag. sc. morph

5) Paulina Eva BARSKA (PL)
6) Beata Kamila BRAUER (PL)
7) Joanna DMOWSKA (PL)
8) Ewelina HARMACINSKA (PL)
9) Marzena Maria MURAWSKA (PL)
10) Anna OZIEBLOWSKA (PL)
11) Joanna SIERACKA (PL)
12) Tatiana Ewa ZIENTARA (PL)

E) Bac. sc. hum.

13) Jitka SKALICKA (IT)

F) Bac. sc. phil.

14) Willfred Hartig (DE)

G) Bac. sc. morph.

15) Aleksandra BOJANOWSKA (PL)
16) Barbara LIBERSKA (PL)
17) Kinga Joanna MATUSIAK (PL)
18) Agnieszka MATUSZEK (PL)
19) Karolina TROJNAR (PL)

C^iuj sukcesaj kandidatoj ricevis siajn ekzamendokumentojn dum la solena fermo de SUS 27

Elkore salutas
Dieter Quednau
direktoro de la ekzamenofico de AIS

**Noto**: Ankorau' ne sciite kiel pasigis la ekzamenojn en Lublin (Pollando) niaj studentoj Egli Brati, Elton Zaimi, Anri Subashi kaj Erion Lato.

**Vortaro granda Albana –Esperanta**

**Ĝis nun 6000 vortoj!**

Kiel sciite doc. Vasil Pistoli, direktoro de la Albana Esperanto-Instituto jam kompilis pliajn pag'ojn por lia granda albana –esperanta vortaro. Ĝis nun estas inkluzivitaj en tiu vortaro 6000 vortoj (inkluzive de litero ë)
Jen la pag'oj dedic'itaj al la litero "ë"

| | | |
|---|---|---|
| **Ë** | pj.(participo) | c'u ne |
| Ëhë | pj.bised. | jes |
| Ëmbël (e0 | f.verbo | dolc'aj'o |
| Ëmbël (të) | asnj.neu'tr. | dolc'eco |
| Ëmbël (i,e) | mb.adjek. | dolc'a |
| | Fig. | milda |
| Ëmbël | ndajf.adv. | dolc'e, |
| milde | | |
| Ëmbëlak | mb.perk.adjk. | agrabla, |
| c'arma, plac'a, plezura,afabla | | |
| Ëmbëlosh | mb.adjek. | dolc'eta |
| Ëmbëlsi | e.subst. | dolc'eco |
| Ëmbëlsim | m. | dolc'igo |
| Ëmbëlsiq | mb. | dolc'eta |
| Ëmbëlsirë | e. | dolc'aj'o |
| Ëmbëlsohem | vetv. | dolc'ig'i |
| Ëmbëlsoj | kal.tranz. | dolc'igi |

| | | |
|---|---|---|
| Ëmbëlsuar (i,e) | mb. | dolc'iga |
| Ëmbëlti | f. | dolc'eco |
| Ëmbëtim | m | dolc'igo |
| Ëmbëltohem | vetv. | dolc'ig'i |
| Ëmbëltoj | kal. | Dolc'igi |
| Ëmbëltor | m | dolc'aj'isto,frandaj'isto |
| Ëmbëltore | f | konfitejo, |
| frandaj'ejo | | |
| Ëmë | f | patrino |
| Ëndet | vetv. | delekti, |
| g'ojigi | | |
| Ëndë | f | plezuro, |
| plac'o | | |
| Ëndërr | f | somng'o |
| Ëndërrim | m | song'(ad)o, revo |
| Ëndërrimtar | mb | song'ema |
| Ëndërrimtar | e. | Song'anto,revanto |
| Ëndërrit | jokal. | Song'i, |
| revi | | |

Ëndërroj jokal. Song’i,
revi
Ëndërror mb.poet song’a,
reva
Ëndërrshpjegues song’interpretisto
Ëndërrt (i, e) mb. song’a
Ëndërrtar mb.poet song’anta
Ëndërrues mb.f song’antulo
Ëndërrvrarë mb.poet disrevig’a
Ëndje f. Plezuro
Ëndrras ndajf. Song’e
Ëndshëm (i) mb. Agrabla

Ëndshëm ndajf. agrable
Ënjt kal. Ŝveli
Ënjtem vetv. s'veli,
pufig’i
Ënjtje f. Pufig’o,
s'velig’o
Ënjtur (e) f. Pufig’o
Ënjtur (i,e) mb. s'vela,pufa
Është f. Estas (li,
s'i)

**Rita Permeti**

## Esperanto movado

### Invito al seminario

Saluton! Mi kunsendas .pdf dosierujo kiu estas oficiala alvoko por cxeesti la seminarion TAMEN (Teslicxa Alvoko Movigxi al Euxropa Nacieco) kiu okazos komence da okobro 2004 en Respubliko Srpska, Bosnio kaj Hercegovino.
Bonvolu vizitu: http://www.esperanto.rs.ba/tamen Bonvolu kontaktu: tamen@esperanto.rs.ba **Igor MILOVANOVIC, prezidanto Esperanto-Societo "Tesli?"**

## Libroj

### La dang’era lingvo- verko tre valorega de Ulrich Lins

Lastatempe atingis nin la libro “La dang’era lingvo” verkita de s-ro Ulrich Lins. Antau’e ni disponis ties italan version, pro tio mi petleteris al la au’toro por ke li, se eble, sendu al mi la esperantan version. Bons’ance la au’toro sendis g'in kaj mi estas g'uante ties tre ric’an kaj interesan enhavon. Interalie, min allogis la c'apitro “Socialismo kaj lingvo internacia”. En tiu c'apitro Ulrich eksplicas vaste kaj profunde tiajn demandojn: Ĉu la malapero de Esperanto en Sovetunio estis klarigebla el la tradicio de socialismo, precipe de g'ia marksisma variaj’o? Ĉu la idearo de socialismo liveras teorian pravigon por la ekzisto de la esperanto-movado? Kaj ankau’: Kiaj estis la klopodoj de sovetaj esperantistoj formuli teorian bazon por sia agado en Soveta Unio?
Poste li pritraktas sinsekve tiajn temojn: Frusosialistaj revoj pri universala lingvo; La problemo de antau’revolucia internaciismo c'e Marx kaj Engels; Kautsky kaj la vojo al lingva unueco en socialismo; Unuaj reagoj al Esperanto kaj la opinio de Gramsci; Stalin, Marr kaj la praktika agado de Soveta Esperantista Unio SEU; Kultura revolucio kaj la dialektiko de Stalin; La miskalkulo de Jazykfront; Diskuto pri la rusa lingvo; Letero de Stalin kaj la “Tezoj pri internacia lingvo”; La vana teoriumado.

Nur c'i supre menciite sufic'as por konstati kiom serioze la au'toro sin okupis pri tiu granda temo. Certe la libro estas unu el plej grandaj valoraj'oj de nia esperantista literaturo.

**Bardhyl Selimi**

**<u>Novaj'oj el Herodo Komunikas</u>**

**SIMPOZIO PRI "ESENCO KAJ ESTONTECO DE ESPERANTIO"**

Disvolvighis kun sukceso la dutaga simpozio (8-9 augusto 2004) de KCE pri "Esenco kaj estonteco de Esperantio", al kiu prelege kontribuis Kep Enderby, sen. Vinko Oshlak, Giorgio Silfer, Hiroyuki Usui, sen. Walter Zelazny kaj (skribe) Daniel Durand. Bondezirajn kaj salutajn mesaghojn sendis interalie la ghenerala sekretario de SAT kaj la prezidanto de TEJO. La Esperanta Civito surloke salutis pere de sen. Ljubomir Trifonchovski, unua Vickonsulo. La bonvenigan enkondukon faris la vicprezidanto de KCE, sen. Perla Martinelli, kiu tagprezidis alterne al sen. Bertil Nilsson. Kun diversaj akcentoj kaj nuancoj, la cheestantoj ghenerale konsentis pri la absoluta bezono de gravaj shanghoj, por la pluvivo de Esperantio. Kep Enderby insistis pri la neceso superi la Bulonjan neutralecon, kaj trovis

la federisman formulon de la Civito ege interesa tiurilate. Vinko Oshlak, komparante la pozicion de Zamenhof kun tiu de la nuntempuloj, rimarkigis la kongruon inter homaranismo kaj raumismo. Ke chi-lasta trovu sian vojon en Azio, estis la kerno de la prelego de Hiruyoki Usui, kiu prezentis la defion kun siaj lumoj kaj ombroj. Walter Zelazny skizis la bezonon reloki la fenomenon Esperantion en la nunan mondon: chu biologia konservanto de nerealigita projekto (la universala lingvo), chu disvastiganto de kulturlingvo kiu estas per si mem valoro en la monda civilizo. Daniel Durand emfazis la rolon de la mondcivitanoj. Giorgio Silfer analizis la funkciojn de komunikado kaj reprezento rilate al esperanto, konkludante ke Esperantio rilatas esence al la dua, kiun Zamenhof asimilis al homarana mondpercepto: lau Silfer, la Civito estas la sola kiu kapablas plenumi tiun identigan funkcion, nuntempe -- ghuste tial la Civito ekspansias, dum la tradicia esperanto-movado regresas. Tuta pagho de "Heroldo de Esperanto" 2058 (11:2004), nun presata, estas dedichita al la simpozio, kun resumoj kaj eltirajhoj el la prelegoj. La

kompletaj tekstoj aperos en la venontaj numeroj de "Literatura Foiro": plej unua, kiel eseo en LF 211 (oktobro 2004), tiu de Giorgio Silfer pri "Komunikado kaj reprezento". La tekstojn kolektos ankau sen. Oshlak, kun aliaj, en propre editorita libro, kiu povos roli kiel Aktoj de la Simpozio. La Esperantlingva parto de la internacia humanista organizajho Ligo "Humanitas" estas en procezo de transformigho al Humanista Frakcio de Sennacieca Asocio Tutmonda. La Humanista Frakcio de Sennacieca Asocio Tutmonda havas interretan adreson <http://www.geocities.com/humanistujo>. La 31-an de oktobro 2004 en Zagreb (Kroatio) okazos la 4-a (eksterordinara) sesio de la asembleo de Ligo "Humanitas", dum kiu estos farita decido pri daura sorto de Ligo "Humanitas". La nuna kunordiganto de Ligo "Humanitas" (Mato Spekuljak) estas en demisio.

Nek TTT-ejo nek elektronika adreso de la ligo estas dume en (iama) funkcio.LASTA GAZETARA KOMUNIKO DE LIGO "HUMANITAS" Kunordiganto de Ligo "Humanitas" estas en demisio kaj plena retirigho el la publika engaghigho en Esperantujo. La 31-an de oktobro 2004 kun komenco je la 16-a horo en sidejo de Ligo "Humanitas" (Ostarijska 8, HR-10000 Zagreb, Kroatio) okazos eksterordinara sesio de la

asembleo de la ligo, dum kiu estos decidita pri daura sorto de Ligo "Humanitas" en la kroata lingvo. Esperantlingva parto de la ghisnuna dulingva - esperantlingva kaj kroatlingva - internacia humanista organizajho Ligo "Humanitas" estas en proceso de jhusa parta transformigho al Humanista Frakcio de Sennacieca Asocio Tutmonda. Oficiala retpaghejo de la Humanista Frakcio de S.A.T. havas ttt-adreson <http://www.geocities.com/humanistujo>. Al esperantistoj-humanistoj kiuj ial ne volas alighi al Humanista Frakcio de S.A.T. estas proponata fondi novan - nur esperantlingvan - Ligon "Humanitas" (kiel posteulon de la ghisnuna ligo) au almenau partopreni publikan sendependan esperantlingvan interretan humanistan forumon <http://groups.yahoo.com/group/humanistujo/>. Esperantlingva ttt-ejo de la ghisnuna Ligo "Humanitas", kiu povas esti laudezire transprenita por fondo de la nova - esperantlingva - humanista asocio, estos ghis fino de jaro 2004 malfermebla lau ttt-adreso <http://www.geocities.com/adhumanitatem>. Kunmetinto de la ghisnuna ttt-ejo de Ligo "Humanitas" publike rezignas de iu ajn kopirajto je kunmetita de li pagharo. Sidejo de Ligo "Humanitas" - ghis la eksterordinara sesio de la asembleo de la ligo - restas kontaktebla nur lau sia kutimposhta adreso (vidu supre). Chiu ghisnuna membro de Ligo "Humanitas" disponas per kompleta adresaro de chiuj ghisnunaj membroj de Ligo "Humanitas" kaj povas laudezire iniciati novan ligon transprenante sur sin taskon de ghia fondkunordiganto.

**MATO SPEKULJAK**
**kunordiganto de Ligo "Humanitas"**

**LASTA GAZETARA KOMUNIKO DE LIGO "HUMANITAS"**

Kunordiganto de Ligo "Humanitas" estas en demisio kaj plena retirigho el la publika engaghigho en Esperantujo. La 31-an de oktobro 2004 kun komenco je la 16-a horo en sidejo de Ligo "Humanitas" (Ostarijska 8, HR-10000 Zagreb, Kroatio) okazos eksterordinara sesio de la asembleo de la ligo, dum kiu estos decidita pri daura sorto de Ligo "Humanitas" en la kroata lingvo. Esperantlingva parto de la ghisnuna dulingva - esperantlingva kaj kroatlingva - internacia humanista organizajho Ligo "Humanitas" estas en proceso de jhusa parta transformigho al Humanista Frakcio de Sennacieca Asocio Tutmonda. Oficiala retpaghejo de la Humanista Frakcio de S.A.T. havas ttt-adreson<http://www.geocities.com/humanistujo>. Al esperantistoj-humanistoj kiuj ial ne volas alighi al Humanista Frakcio de S.A.T. estas proponata fondi novan - nur esperantlingvan - Ligon "Humanitas" (kiel posteulon de la ghisnuna ligo) au almenau partopreni publikan sendependan esperantlingvan interretan humanistan forumon <http://groups.yahoo.com/group/humanistujo/>. Esperantlingva ttt-ejo de la ghisnuna Ligo "Humanitas", kiu povas esti laudezire transprenita por fondo de la nova - esperantlingva - humanista asocio, estos ghis fino de jaro 2004 malfermebla lau ttt-adreso <http://www.geocities.com/adhumanitatem>. Kunmetinto de la ghisnuna ttt-ejo de Ligo "Humanitas" publike rezignas de iu ajn kopirajto je kunmetita de li pagharo. Sidejo de Ligo "Humanitas" - ghis la eksterordinara sesio de la asembleo de la ligo - restas kontaktebla nur lau sia kutimposhta adreso (vidu supre). Chiu ghisnuna membro de Ligo "Humanitas" disponas per kompleta adresaro de chiuj ghisnunaj membroj de Ligo "Humanitas" kaj povas laudezire iniciati novan ligon transprenante sur sin taskon de ghia fondkunordiganto.

**MATO SPEKULJAK**

**kunordiganto de Ligo "Humanitas"**

**ESPERANTOLOGIA FAKULTATO 2005 EN SVISLANDO**
Kultura Centro Esperantista organizas la duan sesion de la Esperantologia Fakultato, en Chaudefono 2-6 kaj 9-13 augusto 2004. Eblas partopreni nur en unu el la du semajnoj, kvankam la programo ne ripetighas. Eblas ankau sekvi nur parton de la lekcioj. La Fakultato proponas kvar periodojn (po 1h30) chiutage, kun tri diversaj profesoroj: Duncan Charters (Usono), pri metodiko de la lingvoinstruado, kun specifa rilato al esperanto; Giorgio Silfer (Europo), pri elementoj de historio de la Esperanta parolkomunumo kaj ghia kulturo; Hiroyuki Usui (Japanio), pri interkulturaj problemoj en Esperantio. La Esperantologia Fakultato 2005 estos aparte interesa por chiu, kiu deziras instrui esperanton.
KCE proponas ne nur la kursejon, sed ankau la loghigan servon, je moderaj prezoj.
Por informoj: <kce.esperanto@bluewin.ch>

**<u>Leteroj</u>**

**Helppeto**
Kara amiko! Mi jxus revenis el Cxinio, en kies cxefurbo Pekino mi partoprenis mirindan UK-on. Kiel kutime, mi havis eblon renovigi malnovajn amikecojn kaj starigi novajn. Inter tiuj miaj novaj amikoj, estas s-ro Zhuang Qixiong, al kiu mi donacis la albanan libreton Asdreni Versajxoj. Tiu cxina samideano gxin tradukis al la cxina lingvo kaj nun deziras havi detalan biografion pri la auxtoro. Tial mi petegas vin, cxu vi bonvolus kontentigi tiun mian amikon! Se tio eblos kaj se tio ne donos troan laboron al vi, mi estos tre danka. Mi aldonas parton de lia mesagxo kune kun lia adreso > Fine mi jam tradukis la libron<Asdreni Versajxoj> el Esperanto en la cxinan lingvon.Tamen mi scivolas detelan biografion pri Asdreni kaj aliaj.Cxu vi povus helpi min?Antauxdankon!!! incere via Zhung Qixiong Mia adreso:
**Zhuang Qixiong**
402/14 Jiao Fu Ying,Fuzimiao Nanjing CN-210001, Jiangsu Cxinio jen lia retadreso: zhuangespero@sina.com

- Karaj albanoj,

Jes, mi bonfartas. Mi esperas, ke cxio bonas ankaux por vi. Dankon pro via demando. Viajn artikolojn kiuj ankoraux ofte trovigxas en Monato mi ankoraux sxatas legi, por havi iom da informo pri via Albanio kaj ties popolo. Mi ankoraux sxuldas al vi respondon al via demando rilate al religiaj grupoj en Usono kaj iliaj sxajne pacaj interrilatoj. Mi klopodos taksi cxi tiun temon, tamen mi ne povas fari tion kiel lertulo, cxar mi fakte ne estas tia. Mi ecx dubas, cxu mi povas doni al vi iun ajn informon ne jam konata al vi. Tamen, bonvolu atendi iom plu kaj mi faros mian plej bonan. Sincere,
**Henry Studer, Usono**

- Georges-Henri Clopeau (Geori) <ghmcl@wanadoo.fr> petas vastan diskonigon de tiu alvoko, kies franclingva originala teksto aperas poste. Ghi koncernas ne nur Francion. Ghi estas transskribita en Unicode.

**Alvoko al ĉiuj !** Pri franca evento kiu koncernas la tutan nunan mondon :

*Dum la monda milito (1940-45 ), en Francio okupita de la nazia armeo, civitanoj organizis Rezistadon. Dume, ili revis pri la paca humana socio, kiun ili volis starigi post la liberado. Tiel,la « Nacia Konsilantaro de la Rezistado » verkis kaj publikigis, la 15an de marto 1944, programon, kiu inspiris la konstitucion de la kvara respubliko kaj ankaŭ la « Universala Deklaracio pri la Humanaj Rajtoj ».*

*Post la milito, dum kelkaj jaroj (20 ?,30 ?), la sekureco (pri sano, laboro, maljuneco), la « egaleco de la ŝancoj », la respekto de la Humanaj Rajtoj, multe kreskadis. Kaj la konduto de la evoluitaj landoj rilate al la « tria mondo » iom pliboniĝis.*

*Sed nun, ni vidas tiujn plibonaĵojn faligitaj de la mekanismo de la « libera konkurenco ». Kelkaj Rezistanoj, kiuj ankoraŭ vivas, decidis dum marto 2004 alvoki al rememoro de la idealo kiu venkis la naziismon.*

*Estus dezirinde ke tiun alvokon la tuta mondo aŭdu. Sed kompreneble, la « amaskomunikiloj kiuj sin vendas » ne deziras ĝin dissendi. Nur vi, esperantistoj, povas traduki ĝin al via propra landa lingvo, kaj se vi ĝuas efikajn rilatojn, konatigi ĝin al plej multe da homoj kiel eble*

*Dankeme :*

*Georges-Henri Clopeau*

Jen tiu alvoko :

Tiam kiam ni vidas kontestita la bazon de la socialaj konkeroj de la « Liberado », ni, veteranoj de la Rezistado kaj de la batalantaj fortoj de la « Libera Francio » (1940-1945), alvokas la junajn generaciojn por vivigi kaj transdoni la Rezistadan heredon kaj ĝiaj ĉiam nunajn idealojn pri ekonomika, sociala, kaj kultura demokratio.

Poste 60 jaroj, la naziismo estas venkita, dank'al la ofero de niaj gefratoj en Rezistado kaj de la nacioj, unuiĝitaj kontraŭ la faŝisma barbareco. Sed tiu minaco ne tute malaperis kaj nia kolero kontraŭ maljusteco ĉiam same estadas.

Ni, konscience, alvokas glori la nunecon de la Rezistado, ne por helpi al aferoj partizanaj aŭ instrumentigitaj de iu potenca vetaĵo, sed por proponi al ontaj generacioj plenumi tri agojn humanistajn kaj funde politikajn (laŭ la prava signifo de tiu vorto), por ke la flamo de la Rezistado neniam forpasos.

Ni unue alvokas la edukistojn, la sociajn movadojn, la publikajn komunumojn, la kreantojn, la civitanojn, la ekspluatitojn, la humiligitojn, kuniĝante glori la naskiĝtagon de la « Programo de la Nacia Konsilantaro de la Rezistado », adoptita en kaŝeco la 15an de marto 1944 : Sociala sekureco, emerita pensio por ĉiuj, kontrolo de la ekonomikaj feŭdoj, rajto por ĉiu al kulturo kaj edukado, gazetaro liberigita de mono kaj koruptado, socialaj leĝoj por laboristoj kaj terkulturistoj, k.t.p….Kiel eblas, ke hodiaŭ mankas mono por konservi kaj pliampleksi tiujn sociajn konkerojn, kvankam la produktado da riĉaĵoj multe grandiĝis de post la Liberado, periodo kiam Eŭropo estis ruinigita ? La politikaj, ekonomikaj, intelektaj respondeculoj devas nek demisii nek lasi sin impresita de la internacia diktaturo de la financaj marketoj, kiuj minacas pacon kaj demokration.

Ni due alvokas movadojn, partiojn, asociojn, instituciojn kaj sindikatojn, heredantajn de la Rezistado, preterpasi la fakajn defiojn, kaj unue sin dediĉi al la politikaj kialoj de la maljustaĵoj kaj de la sociaj bataloj (kaj ne nur al iliaj konsekvencoj), kuniĝite difini novan « Programo de Rezistado » por nia jarcento, neforgesante ke faŝismo ĉiam sin nutras de rasismo, de maltoleremo, kaj de milito, kiuj vice sin nutras de la socia majusteco

Fine ni alvokas la infanojn, la gejunulojn, la gepatrojn, la geedukistojn, la publikajn instancojn, al vera paca ribelo kontraŭ amaskomunikiloj kiuj proponas al nia junularo kiel nuran horizonton la merkatan konsumadon, la malestimon al la pli malfortaj kaj al la kulturo, la disvastiĝantan amnezion kaj la konkurencon de ĉiuj kontraŭ ĉiuj. Ni ne akceptas ke la pli gravaj medioj estu nun kontrolitaj de privataj interesoj, kontraŭe al la « programo de la Nacia Konsilantaro de la Resistado » kaj al la dekretoj pri gazetaro de 1944.

Pli ol ĉiam, al ĉiuj kiuj konstuos la komencantan jarcenton, ni volas diri, kun nia kareco : « Krei estas rezisti, rezisti estas krei »

Subskribis : Lucie Aubrac, Raymond Aubrac, Henri Bartoli, Daniel Cordier, Philippe Dechartre, Georges Guingouin, Stephane Hessel, Maurice Kriegel-Valrimont, Lise London, Georges Seguy, Germaine Tillon, Jean-Pierre Vernant, Maurice Voutey.

- **Estimata S-ro,**

Koran specialan dankon pro via mesagho. Estas tre grave por mi ricevi vian opinion, char tiel mi sentas, ke mi ne laboras vane, sed ke la de mi redaktata gazeto atingas interesatajn legantojn. Mi ghojus inkludi en la gazeto materialon lau viaj sugestoj! Aparte mi ghojas ricevi mesaghon el Albanio, lando belega kaj interesa lau tio kion mi audis ne nur de Josi Shemer en prelego, sed ankau multe antaue de amaskomunikiloj. Certe iun tagon mi sukcesos viziti vian landon. Denove kore dankas,
**Doron Modan,**
**Red. de Israela Esperantisto**

**<u>Vojag'impresoj</u>**

**28 tagoj en C’inio**

..C’io estis grandioza, vasta, senlima, giganta. Shanghai, ne urbo, iu fantasta kunmetaj’o de s'talaj turegoj kaj vitraj nubskrapuloj, dekoj da supervojoj interkrucig’antaj je nekredeblaj altecoj- subite, neatendite, jen mallarg’aj, mallumaj vojetoj kie homoj kuiras surstate, elmetas siajn varojn en etaj budoj kie ec’ stari malfacilas, por denove, malantau’ la angulo, malkovri strategojn kie brilaj festlumegoj multkoloraj invitas vin al luksa restoracio, al teatra spektaklo, al butikumado.Viglas la vivo, dumtage kaj dumnokte, freneze kaj verve laboras kaj umas la homoj, kiel formikoj en sia formikejo. Kaj ni ne parolu pri trafiko!

Kaj kion diri pri Guilin, la perlo de C’inio? C’i tie vi plong’as en iun eksterordinaran natur-spektaklon, unikan en la tuta mondo, inspirintan famajn c'inajn poetojn kaj pentristojn. “Sukerpanoj”el kalka s'tono levig’as el la akvoj de rivero Li, el senfinaj rizejoj, kaj sorc’e kaptas vian koron kaj postlasas nedireblajn kaj neforgeseblajn emociojn.

Se ne Guilin dia fingro karesis por igi g'in tiel mirindan, en Xi’an oni havas kroman pruvon, kiom superpova estas la ambicio de ordonanto kaj kiom alrarta la kreemo de plenumantoj. Preskau’ c'iuj ja konas la plej famajn bildojn de la terakota armeo, sed vidi g'in en sia kompleteco kaj g'uste en la loko kie en la jaro 221 a.K. la unua imperiestro de unuigita C’inio Qin Shihuang Di g'in ekkonstruigis, estas afero kiu lasas vin senspira kaj senvorta. Legendo, onidiroj, troigitaj supozoj, historiaj priskriboj rakontas pri giganda verko, pri urbo subtera ampleksanta 50 $km^2$ –ojn, pri riveroj el hidrargo, pri pli ol 700 mil laboristoj, metilaboristoj kaj artistoj, kiuj laboris dum 36 jaroj...Kaj ankorau’ multo kas’ig’as subtere!

**Elda Doerfler**

**Vojaĝimpresoj el Boris Kolker**

**Karaj amikoj!**

Ni revenis el Pekino post la rava vojagxo. Vi legos detale pri la Kongreso en la gazetaro. Ankaux mi plusendos al vi kelkajn aperintajn kaj aperonajn informojn. Sed dume kelkajn vortojn pri la persona partopreno. Mi gvidis du seminariojn, en kiu okazis po tri prelegetoj kaj tre viglaj diskutoj: pri la historio de Esperanto (kun la pola televidisto Roman Dobrzinski kaj usona veterana esperantisto Bill Harmon); mi rakontis pri la trovita de mi artikolo de Zamenhof pri la juda demando; plene tiuj interesegaj materialoj jxus aperis en la gazeto "Israela esperantisto", 2004, n-ro 140; pri la verkado (kun Anna Lowenstein el Italio, auxtorino de la romano "La sxtona urbo" kaj Kobayasi Tsukasa el Japanio, auxtoro de pli ol 100 libroj); mi prezentis nian "Vojagxo"-n kaj emfazis gxian signifon por alproprigo de krea lingvorego kaj verkado. Anna donis tre utilajn praktikajn konsilojn por verkado. Grave kontribuis du rusianoj - Nikolao Gudskov (pri la literatura klubo en Moskvo) kaj Viktoto Kudrjavcev (pri "Komencanto" - gazeto por novaj verkantoj). Mi partoprenis en la publika kunveno de la Akademio de Esperanto kaj rakontis tie pri la Akademia konsultejo. Mi estis unu el la ekzamenantoj por la internaciaj ekzamenoj. Komencis ekzamenigxi 10 personoj; sukcesis 3 por la elementa kaj 3 por la meza. Inter la lastaj estis vjetnamo Nguyen Xuan Thu, la sola kun la poento "perfekte". Li tiel sukcesis, cxar li memstare trastudis nian "Vojagxo"-n kaj ecx instruis per gxi. Jen la instiga ekzemplo! Mi partoprenis en la kunsido de EVA (Esperantligva Verkista

Asocio). Ankaux tie mi iom prezentis "Vojagxo"-n kaj parolis pri lastatempaj iniciatoj de tiu asocio. En la esperantologia konferenco mi substrekis, ke neeuxropaj lingvoj povas grave kontribui al la evoluo de Esperanto precipe per modeloj por vortfarado kaj vortkombinoj. La vic-urbestro de Pekino invitis ducenton da kongresanoj por bankedo; ankaux mi cxeestis tiun feston de la cxina kuir-arto. En la Kongresa libroservo estis rapide forvenditaj cxiuj kunprenitaj 20 ekzempleroj de "Vojagxo". Pluraj homoj aliris min kaj esprimis bedauxron, ke ili ne sukcesis acxeti la libron pro gxia elcxerpigxo. Multaj homoj petis auxtografon sur "Vojagxo" (Steve el Havajoj ecx alportis sian ekzempleron speciale, por ke mi auxtografu gxin) aux fotigxon kun mi. Precipe pluraj cxinaj esperantistoj strebis konatigxi kun mi persone. Ni revidis multegajn amikojn kaj konatojn diverslandajn kaj ricevis donace iliajn librojn kaj kompaktajn diskojn. La Esperanto-redakcio de la Pola radio prenis de mi du intervjuojn: pri la du supremenciitaj seminarioj, pri "Vojagxo", pri la polemika artikolo de Zamenhof, pri mia esperantumado gxenerale. Esther kantis dum la Internacia Arta Vespero en la Internacia Hxoro el pli ol 40 personoj el 14 landoj, kiun gvidis Alan Bishop el Auxstralio. La hxoro kantis ankaux "La Espero"-n fine de la kongresa Fermo; cxar kelkaj hxoranoj tiumomente jam forveturis, Alan petis ankaux min kunkanti, kion mi volonte faris. La Malfermon kaj Fermon de la Kongreso partoprenis kaj alparolis la kongresanojn multaj eminentuloj de la registaro kaj socio de Cxinio. La cxinaj gazetaro kaj televido cxiutage informis pri la kongreso. Estis bonaj koncertoj. Precipe brila estis la Nacia vespero, kun partopreno de plej bonaj cxinaj kantistoj, dancistoj kaj cirkistoj. Ni partoprenis en kvar ekskursoj, inter ili al la Granda Cxina Muro. Ne eblas priskribi cxion partoprenitan, viditan kaj sentitan. Tial mi nur mallonge prezentis la personan partoprenon. Se vi havas demandojn, mi volonte respondos ilin. Amike, **Boris, iom laca sed entuziasma.**

## Europa Esperanto-vojagxo

Dum 22 de augusto gxis 1 de septembro 2004 okazis internacia busvojagxo kun esperantistoj el Latvio, Pollando kaj Rusio al la 6 Europunia Esperanto-Kongreso en Bilbao (Hispanio). La vojagxantoj vizitis survoje ses cxefurbojn de Europo: Berlino, Luksemburgo, Andora de la Vella kaj revene Parizo, Bruselo kaj Amsterdamo kaj ankau francajn urbojn Nancy kaj Lourdes – la plej faman katolikan pilgrimlokon. Dum la 6 Europunia E-Kongreso sukcese prezentigxis por la urbo Bilbao du polaj junularaj ensembloj de moderna danco "Baby Jagi" kaj "Rytmix" el urbo de Nikolao Kopernik – Torun. Oni ankau partoprenis programerojn de la 6 EEK kaj vizitis Bilbaon kun muzeoj, sxipekskursis al Portugalete, plagxumis en Getxo kaj Plantzia kaj ankau vizitis ripozlokojn de Biskaja Golfo kaj Guernika. Post la interesa vojagxo cxiuj revenis al Bydgoszcz kontentaj atendante novajn E-vojagxojn por la 2005 jaro. Internacia Klubo "Esperantotur" en Bydgoszcz, Pollando

## TURISMA ESPERANTO-KALENDARO 2005

Internacia Klubo "Esperantotur" en Bydgoszcz tradicie septembre prilaboros Turisman E-Kalendaron por 2005 jaro kaj publikigos gxin en hejmpagxo: www.esperanto-turismo.com kaj en diversaj informiloj. Se vi volas, ke ni informu pri internaciaj E-arangxoj por 2005 jaro, kiujn vi organizas, au pri kiuj vi scias, por aperigi en tiu kalendaro TEK-2005 sendu gxis la 15-a de septembro 2004 almenau jenajn informojn:

datoj kaj loko de la internacia E-arangxo, nomo de la arangxo, ev. temo, adreso de la organizanto au informanto pri la arangxo.
Se vi volas, ke la Internacia Klubo "Esperantotur" sendu ankau E-grupojn por via E-arangxo, sendu ankau prezojn de la arangxo (almenau logxad-proponojn kaj provizoran programon) kaj aliajn partoprenkondicxojn.
Ni estos ankau dankemaj, se vi sendos korektojn kaj kompletigojn de la Turisma Esperanto Adresaro, kiu legeblas en nia retpagxo: www.essperanto-turismo.com .
Koran dankon pro via kunlaboro kaj informado pri internacia Esperanto-turismo al aliaj, kio helpas rekoni Esperanton kiel lingvon de la internacia turismo.
Internacia Klubo "Esperantotur"
str. M.Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 BYDGOSZCZ
Pollando, tel./fax: +48,52,3461151, e-mail: info@esperanto-turismo.com

## UEK-Pekino

### Nova estraro

Jen la nova UEA estraro elektita en Pekino, kiu laboros g'is 2007 jaro:
Renato Corsetti-prezidanto; Claude Nourmont, vicprezidanto; Ulla Luin, g'enerala sekretario; Ans Bakker ten Hagen, financisto; Yu Tao, membro; Maritza Gutierrez Gonzales, membro; Amri Wandel, membro

### Pekina Deklaro

Traktinte la temon “Lingva egaleco en internaciaj rilatoj”; notante ke 2004 jaro markas 50 jarojn da oficialaj rilatoj kun UNESCO; memorante ke rezolucioj de UNESCO notis rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj inters’ang’oj kaj por proksimigo de la popoloj de la mondo kaj rekonis, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de UNESCO; notante la “Raporton pri Homa Evoluigo 2004” de la Evoluiga Programo de Unuig’intaj Nacioj, kiu asertas, ke libereco de esprimado kaj la uzado de lingvo estas nedisigeblaj; alte taksante la agadon de la c'ina registaro, kiu, cele al pli justa kaj diverseca aliro al internacia interkomprenig’o, subtenas la instruadon kaj utiligon de Esperanto, konforme al la spirito de la rezolucio de UNESCO:
Deklaras ke demokratia kaj egalrajta komunikado en internaciaj rilatoj estas esenca por internacia interkompreno kaj paca kunlaboro surbaze de egalaj lingvaj rajtoj; ke estas bezonata nova internacia lingva ordo, kiu garantiu egalecon, diversecon kaj demokration en lingvaj aferoj kaj efikan komunikadon inter nacioj kaj aliaj homgrupoj lingve malsamaj, c;ar en la nuna mondo lingva situacio, kun kreskanta superrego de iuj lingvoj super aliaj, ne eblas realigi tiujn principojn; ke neu’trala komuna lingvo estu kerna elementoen tiuordo, por atingi unuecon en diverseco inter la diversaj lingvoj kaj kulturoj je internacia nivelo; ke sekve la internacia lingvo Esperanto, pruvinte dum pli ol cent jaroj siajn utilecon kaj praktikecon, meritas seriozan konsideron fare de internaciaj organizoj, ties membro-s'tatoj kaj c'iuj personoj kaj organizaj’oj de bona volo, kiuj respektas kaj deziras pacon kaj pacan komprenig’on en egaleca etoso en nia hodiau’a mondo; ke por krei novan internacian lingvan ordon, kiu kontribuos al internacia kompreno kaj mondpaco, necesas forte subteni la enkondukadon de esperanto en

lernejojn, konforme al la spirito de la UNESCO-rezolucioj, c'ar tio faciligas lingvolernadon g'enerale kaj antau'enigas internacian aliron al la mondo.
(c'erpitaj el TEA bulteno, sept-okt 2004)

**Prelego**
**Sciencon por la praktiko, praktikon por la scienco:**
Cxu sxanco enkonduki Esperanton en cxinajn lernejojn?
Prelego por Strategia Forumo cxe la 89-a UK
Prof. Liu Haitao
Beijing Guangbo Universitato

Laux la revizita PIV (NPV), Strategio estas "arto kombini rimedojn por trafi iun celon (politikan, ekonomian, didaktikan k.a.)". Do, se ni volas fari ion strategian, ni almenaux devas koni la rimedojn jam posedatajn, kaj pli grave: la trafota celo devas esti klare fiksita. Tamen, la mondo sencxese sxangxigxas. En tiu cxi situacio oni bezonas kompreni kio okazas, kio influas aux sxangxas nian celon, pli grave, cxu kaj kiel oni devas algxustigi la rimedojn por adaptigxi al la sxangxigxinta mondo. Por klare koni celon kaj rimedojn, por atingi pli bonan praktikon, ni bezonas iun helpon, kiu gvidu kaj klerigu nin. Tio estas teorio. Laux NPIV teorio estas "tutajxo de reguloj sisteme organizitaj, bazitaj sur scioj, kiuj servas kiel bazo al scienco aux tekniko, liveras la klarigon de granda nombro da faktoj kaj eksperimentaj rezultoj, kaj kapablas efike kaj gxuste aplikigxi al novaj situacioj". Do, la praktiko estas fundamento de teoriumo. Post suficxaj praktikoj oni devas analizi la atingojn, el kiuj oni povas eltiri konojn por pluevoluigi la teorion. La nova teorio gvidos al nova praktiko, k.t.p. Tio formas bonan cirkuladon por progreso de la kampo. Jen la gxenerala regulo en la mondo, kiu ankaux validas en Esperantio.Interlingvistiko povas doni bonan teorian fundamenton, por plialtigi la kvaliton de multaj agadoj de la Esperanto-movado kaj helpi solvi problemojn. Cxar gxi estas scienco pri internacia lingva komunikado, kun cxiuj siaj rimedoj, kondicxoj, efikoj kaj kun cxiuj aspektoj: politika, ekonomia, lingvistika, jura, sociologia, informadika, psikologia, kulturologia k.a. Gxi ankaux estas scienco kiel optimumigi la internacian lingvan komunikadon per planlingvoj. Tiel, gxi ankaux estas la scienco pri planlingvoj, konkrete pri la kreado, strukturo, funkciado, evoluado kaj aplikado de planlingvoj. Kio estas planlingvoj? Planlingvoj estas lingvoj, konscie kreitaj laux difinitaj kriterioj por la plifaciligo de la internacia komunikado. El cxirkaux 1000 projektoj, laux socilingvistikaj kriterioj Esperanto farigxis la sole multflanke funkcianta planlingvo. Tio kreis novan brancxon en interlingvistiko la Esperantologion. Gxi esploras la fontojn, konstruprincipojn, evoluon, funkcion, lingvo-komunumon kaj praktikajn komunikajn kapablojn de cxi tiu planlingvo. La studobjektoj de tiuj sciencoj kaj teorioj kredigas nin, ke interlingvistiko estas teoria bazo de la Esperanto-movado, gxi estas grava kaj necesa kaj utila por fari tauxgan strategion por la Esperanto movado.
La praktiko de Cxina Esperanto-movado montras ke Esperanto estas utila en multaj kampoj, gxi iam kontribuis por la reformo de la cxina lingvo, por la liberigo de la nacio, por pli bona interkomunikado kun la popoloj de aliaj landoj. Tiujn spertojn oni devas resumi por atingi pli brilan estontecon de Esperanto. Ni konsideras ke la kialo de la iama sukceso de Esperanto en Cxinio estas, ke gxi montrigxis tauxga rimedo kaj sin metis en la servon de la cxina socio.Jen estas du cxefaj flankoj:

1. Per Esperanto Cxinio povas atingi la pli multajn landojn, kiuj interesigxas pri la cxinaj aferoj, kiujn oni ne facile atingis per aliaj pli 'grandaj' lingvoj. Cxinio volas interkomuniki kun tiuj landoj. Tio estis unu el gravaj celoj de la cxina diplomatio. Esperanto allogis cxinojn ankaux per la "interna ideo", aux pli precize, per la internaciisma idealo. Ankaux Mao Zedong jesis la idealon de Esperanto. Internaciismo estas grava integra parto de la cxina politiko, gxisnune, en la malfermo de multaj konferencoj oni ankoraux kantas 'La Internacio'-n en nia lando. Tial, ne estas malfacile kompreni, kial la cxina registaro subtenas Esperanton eble pli ol aliaj landoj. La historio diras al ni, ke internacia lingvo devas esti neuxtrala, tamen tio ne signifas ke la parolantoj de la lingvo devas agi neuxtrale. La lingvo ankaux devas kontribui al la progreso de la lando. Alidirite, la neuxtrala planlingvo akirus la subtenon kaj evoluadon de registaro nur, se gxi povas prezenti siajn konkretajn valoron kaj utilon al la socio. Tio estas ega kontribuo de cxina Esperanta praktiko al Esperantologio kaj interlingvistiko, cxar unu el la cxefaj temoj de interlingvistiko estas esplori, kiel planlingvaj projektoj povas sukcese ensociigxi. Hodiaux la situaciosxangxigxas. La tutmondigxo, aux pli precize, la usonigxo, freneze balaas la tutan planedon. Tiuj, kiuj rezistas la usonecan tutmondan kulturon, estas izolitaj de la monda ekonomio. Ne estas malofte, ke ni auxdas la dirajxon 'en la tutmondigxa hodiauxo la maluzado de la angla estas plej granda malsxparajxo'. En tiu cxi situacio, se ni ankoraux agadus laux pasintaj metodoj kaj esperus ke la idealo de Zamenhof fine venkos la realon, nin eble demandos laux la titolo de la libro verkita de Tazio Carlevaro: ' Cxu Esperanto postvivos la jaron 2045?'. Ekde gxia naskigxo Esperanto estas lingvo memvole elektita de gxiaj parolantoj. En tiu cxi signifo Esperanto estas popola movado, desuba movado. La tutmondigxa ondego devigas ke cxiuj konsideru siajn agadojn sub la premoj de ekonomiaj utilcelaj fortoj. Nun la Esperanto movado, esence bazita sur idealismo, ne plu tiel altiras la homojn kiel antauxe. Tio estas fakto. Se Esperanto ne povas alporti al la lernantoj la bonajxojn kompareblajn kun aliaj etnaj internaciaj lingvoj, gxi farigxos krize seninteresa lingvo. Bedauxrinde, oni ne povas uzi la saman metodon por Esperanto, kiel por savi minacatajn etnajn lingvojn. Por etnaj lingvoj oni kutime mezuras la gradecon de dangxero, vidante cxu ankoraux ekzistas suficxe da geknaboj denaske lernantaj cxi lingvojn. Se cxe planlingvo denaskuloj tre multas, cxu eble la lingvo perdos la avantagxojn de sia neuxtraleco? Fakte jam multaj sciencistoj pridubas, cxu eterna neuxtraleco de lingvo povas ekzisti.

Sxajnas al mi, la ebla savilo estas enkonduki Esperanton en nacian edukan sistemon. En la cxina sistemo de eduko la studentoj gxenerale komencas la lernadon de fremdlingvo en la meza lernejo. Tiu fremdlingvo hodiaux preskaux cxiam estas la angla. En la nuna sistemo, la lernita fremdlingvo apenaux estas ilo de interkomunikado kaj por aliri la sciojn diverstipajn. La lingvo mem jam farigxis la scio por taksi la homojn. Se la celo por lerni la lingvon cxefe estas por sukcese trapasi la ekzamenojn, ne por ekonomi-cele interkomuniki kun aliaj homoj, tiam evidente oni sxatas la lingvon, kiu povas esti facile regata kaj lernata. Por azianoj kaj cxinoj Esperanto certe estas pli facile lernebla ol la angla. Tio eble donus la eblon ke Esperanto estu akcepita de cxinoj, kiuj urgxe bezonas trapasi la ekzamenojn por pli bona profesia kariero kaj pli alta akademia grado. Nun Esperanto rajtas funkcii kiel la dua fremdlingvo en multaj kampoj en

Cxinio. Baze oni nuriom progesas, nome agnoskante, ke Esperanto havas la saman lokon en la eduka sistemo kun aliaj fremdlingvoj. Kvankam kiel internacia komunikilo Esperanto ne estas komparebla kun la angla. Tamen
Esperanto plifacile donos sciojn, kiujn la ekzamenatoj devas posedi. Esperanto sendube estas pli bela ol la angla en la okuloj de la ekzamenatoj. Per kurba vojo oni povas fari pli multajn parolantojn de Esperanto, tio ege kreskigas la komunikan forton de Esperanto. Por tiuj, kiuj dauxre lernas aliajn lingvojn, la propedeuxtika valoro ankaux tre
utilas por ili. Evidente, se Esperanto povas eniri la edukan sistemon de Cxinio kiel la
unua fremdlingvo, ni urgxe bezonas la instruistojn de Esperanto, kiuj devas esti same kompetentaj kiel tiuj por aliaj lingvoj. Tiuj cxi instruistoj nepre devas esti trejnitaj en universitatoj. Oni devas starigi Esperanto-fakon en universitato. Se tio okazus, oni ankaux devas fondi esplororganizajxon por esperantologio kaj interlingvistiko, kiu liveru al la praktiko la teorian nutrajxon kaj forton. Cxar neniu fako rajtas ekzisti
sen firma teoria fundamento en universitato.Kiam ni revenas el la ideala mondo al la realeco, ni trovas ke la realo estas serioza: Interlingvistiko/esperantologio apenaux aperas en gravaj cxinaj sciencaj verkoj. Tamen, la praktiko indikas ke la redaktoroj ne tute
rifuzas interlingvistikon. Se oni verkas sian studon laux akademiaj reguloj, la celo eble estas trafita. En Cxinio bedauxrinde ankoraux ne ekzistas suficxaj studoj kun scienca nivelo, kiuj estas necesaj por akiri subtenojn de sciencistoj, precipe de lingvistoj, konsiderante ke interlingvistiko funkcias kiel brancxo de lingvistiko. Estas malfacile
trovi klaran subtenon de gravaj lingvistoj por Esperanto. Por cxiuj farendajxoj, oni bezonas la subtenon el la praktiko, do, de cxina Esperanta-movado. Pro tio estus tre konvene, se CXEL estonte pli forte interesigxu pri la teoriaj aspektoj de Esperanto kaj gxeneral pri internacia lingva komunikado.
Sendube, en nuna situacio, kiam ecx la cxina registaro donus al Esperanto pli altan lokon, ni ankaux ne kapablas plenumi la taskon kaj uzi la sxancon. Certe por akiri la subtenon, oni ankoraux devas multe konvinki kaj argumenti, cxar oni ja certe postulos sciencan profiton el interlingvistiko. Por plibonigi la situacion, ni i.a. konisderu por:
1. publikigi bazajn verkojn pri interlingvistiko kaj esperantologio;2. okazigi interlingvistikajn kolokvojn, kiel ili okazas en diversaj landoj;
3. fondi iun organizajxon pri interlingvistiko, iom similfunkcian kiel la germana Societo pri Interlingvistiko (GIL);4. inviti eksterlandajn specialistojn por prelegvojagxoj;5. sendi cxinajn specialistojn al euxropaj interlingvistikaj centroj
por tie studi;6. instigi la studentojn verkantajn diplomlaborajxojn, doktorigajn kaj
alitipajn disertaciojn pri interlingvistikaj temoj en cxinaj universitatoj;7. enkonduki interlingvistikon kiel universitatan studobjekton en lingvistika fako.Por plenumi tiujn cxi taskojn, diversaj subtenoj, financaj kaj politikaj kaj aliaj, el diversaj landoj kaj kanaloj, estas postulitaj. Tamen, cxiuj estas farindaj kaj farendaj, cxar tio ege utilas la evoluadon de Esperanto.
**<renato.corsetti@virgilio.it>**

## 14 Internacia Esperanto Kongreso en Cxinio

Dum la 22-a de julio gxis la 20-a de augusto 2004 okazis en Cxinio la 14 Internacia Esperanto-Kongreso (IEK) organizita de Internacia Klubo "Esperantotur" kaj vojagxoficejo "Flugo" el Bydgoszcz(Pollando).

La celo de la Kongreso estis promocii Esperanto Turismon en Cxinio kaj ebligi ankau partoprenon en la 89-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino. La pli ol 30 kongresanoj el 8 landoj de Europo kaj Azio vojagxis lau ok diversaj vojagxvariantoj plenumante cxies individuajn vojagxdezirojn.
La Kongreson oni komencis per 9-taga restado en Pekino, dum kiu dezirantoj partoprenis la 89 UK-on kaj krome oni realigis plurajn vizitojn, i.a. Malpermesita Urbo, Cxiela Altaro, Somera Palaco, Beihai Parko, Granda Muro kaj Tomboj de Ming Dinastio kun ekskurso al Tianjin kaj Flava Maro, kelkaj temploj, gustumadon de Pekina Anaso kaj akcepton en Universitato pri Administrado.
Sekve oni vojagxis al historia urbo Xi'an por viziti Muzeon de Terakota Armeo, Tamburan Turon, Grandan Moskeon, Pagodon de Granda Ansero, defendomurojn kaj Muzeon de Steloj – la plej pezan sxtonan bibliotekon de la mondo, taoisman templon. Parto de la grupo flugis al Tibeto kaj konatigxis kun Potala Palaco kaj kun aliaj temploj. En Chengdu oni vizitis Instituton de Granda Pando kaj buddisman templon, gustumis la sicxuanan varmegan poton kaj daurigis buse al Chongquing – la 18-miliona aglomeracio, vizitis gxin, ankau sidejon de E-Asocio, denove gustumis la sicxuanan kuirarton kaj per sxipo daurigis krozadon lau Jangcy-rivero spektinte vidindajxojn de Tri Grandaj Gorgxoj, poste de Tri Malgrandaj Gorgxoj kaj fine gorgxojn de Midi-rivero.
La kvartagan krozadon oni finis en Yichang, trapasante kaj poste vizitante la plej grandan akvo-barilon en la mondo. Sekvis vizito en Jiling-urbo kun "Cxu"-kulturo kaj grandega triurboparta Wuhan, kun vizito en Pagodo de Flava Gruo kaj buddisma templo. Per luita buso oni daurigis vojagxon al urbo Hefei, kies reprezentanto S-ro Liu Jianguo – Vicprezidanto de Internacia Klubo "Esperantotur" estis cxefa organizanto kaj E-gvidanto tra Cxinio. En Hefei oni vizitis Bao Templon, la urbon mem kaj oni travivis emocian renkonton en fama Kungfu-lernejo en Hefei.
Sekvis busvojagxo tra Nankin al Suzhou – la fama urbo de silko, gxardenoj kaj Venecio de Oriento, kaj de tie oni daurigis al Hangzhou  7-miliona urbego de gxardenoj kaj silka industrio, tie oni gxuis boatekskurson tra la fama Okcidenta Lago. Sekvonttage oni atingis la plej impresan centron de komerco – Shanghai, kie oni vizitis Urban Muzeon, faman Bund kaj kelkaj bazaroj. Tie la kongreso dividigxis al ses grupetoj  kaj oni daurigis aviadile au trajne al Kantono, kiu impresis per la plej nova moderna flughaveno kaj per vespera sxipekskurso lau Perla Rivero.
Fine oni trajne vojagxis al impresplena Hongkongo, de kie katamarane al Macau. La vizitoj en tiuj urboj finis la ricxegan turisman kaj kulturan programon de la 14 Internacia Esperanto-Kongreso, kiu sukcesis ankau dank'al helpo de pluraj esperantistoj en Pekino, Xi'an, Chengdu, Chongquink, Wuhan, Hefei, Suzhou kaj Kantono – Guangzhou. En Cxinio dank'al esperantistoj bone funkcias internacia Esperanto-turismo.
La vojagxon gvidis nome de Internacia Klubo "Esperantotur" -  gxia prezidanto Andrzej Grzebowski, kaj nome de "FLUGO" – lia filo Andreo Grzebowski – cxefo de la oficejo.
Post la monata Esperanto-vojagxo tra tuta Cxinio cxiuj revenis kontentaj. Jam nun estis planita por majo 2005 jaro la nova E-vojagxo tra Cxinio, kiu promocios ankau la sudajn partojn de Cxinio, inkluzive insulon Hajnan kun gxiaj belegaj plagxoj en Sanya.
Pliajn informoj pri la vojagxo – la 21-a Internacia Simpozio pri Esperanto-Turismo en Cxinio riceveblaj de Internacia Klubo "Esperantotur":
en Bydgoszcz, str. M.Sklodowskiej-Curie 10, Pollando, tel/fax: +48,52,3461151, Rete: info@esperanto-turismo.com

## PEN INTERNACIA CHE LA LONDONA ESPERANTO-KLUBO

Pri "PEN Internacia -- kio ghi estas, kien ghi celas?" prelegis d-ro Giorgio Silfer che la Londona Esperanto-Klubo, la 30an de julio. Al la relative multaj cheestantoj (se konsideri la escepte varman tagon en libertempa semajno) d-ro Silfer proponis la historion de PEN-Klubo, fondita de britaj kaj francaj verkistoj en 1921. Chi tiu asocio de liberaj verkistoj inkluzivas hodiau pli ol 140 centrojn, kiuj ne reprezentas nacishtatojn, sed literaturojn: tial ghi havas ankau esperanto-centron, akceptitan en 1993, post malpli ol dujara ekzisto. PEN estas unu el la dek du plej gravaj internaciaj neregistaraj organizoj en rilatoj kun Unesko: ghia statuso egalas al tiu de Unesko-agentejo pri literaturo. Unesko parte subvencias ghin, speciale ghian revuon "PEN International". En siaj mondkongresoj PEN uzas tri laborlingvojn: la angla, la franca kaj tiu de la gastiganta centro. Se foje la Esperanta PEN organizos tian kongreson, nia lingvo estos enkondukebla. Eventuale en 2008 la mondkongreso okazos en Chaudefono! D-ro Silfer donacis al la Londona Klubo ekzempleron de la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj, kiun li subskribis en Barcelono la 6an de junio 1996. Interalie tiu grava dokumento donas la premison por agnoski la esperantistaron kiel "lingvan grupon", tute kongrue al la principoj de la poste promulgita Konstitucio de la Esperanta Civito. Kompreneble tio multe plachis unuavice al la londonanoj kun Esperanta civitaneco. La prelego estis tre aplaudita kaj d-ro Silfer estis invitita reveni en baldaua okazo.

## SIMPOZIO PRI "ESENCO KAJ ESTONTECO DE ESPERANTIO"

Disvolvighis kun sukceso la dutaga simpozio (8-9 augusto 2004) de KCE pri "Esenco kaj estonteco de Esperantio", al kiu prelege kontribuis Kep Enderby, sen. Vinko Oshlak, Giorgio Silfer, Hiroyuki Usui, sen. Walter Zelazny kaj (skribe) Daniel Durand. Bondezirajn kaj salutajn mesaghojn sendis interalie la ghenerala sekretario de SAT kaj la prezidanto de TEJO. La Esperanta Civito surloke salutis pere de sen. Ljubomir Trifonchovski, unua Vickonsulo. La bonvenigan enkondukon faris la vicprezidanto de KCE, sen. Perla Martinelli, kiu tagprezidis alterne al sen. Bertil Nilsson. Kun diversaj akcentoj kaj nuancoj, la cheestantoj ghenerale konsentis pri la absoluta bezono de gravaj shanghoj, por la pluvivo de Esperantio. Kep Enderby insistis pri la neceso superi la Bulonjan neutralecon, kaj trovis la federisman formulon de la Civito ege interesa tiurilate. Vinko Oshlak, komparante la pozicion de Zamenhof kun tiu de la nuntempuloj, rimarkigis la kongruon inter homaranismo kaj raumismo. Ke chi-lasta trovu sian vojon en Azio, estis la kerno de la prelego de Hiruyoki Usui, kiu prezentis la defion kun siaj lumoj kaj ombroj. Walter Zelazny skizis la bezonon reloki la fenomenon Esperantion en la nunan mondon: chu biologia konservanto de nerealigita projekto (la universala lingvo), chu disvastiganto de kulturlingvo kiu estas per si mem valoro en la monda civilizo. Daniel Durand emfazis la rolon de la mondcivitanoj. Giorgio Silfer analizis la funkciojn de komunikado kaj reprezento rilate al esperanto, konkludante ke Esperantio rilatas esence al la dua, kiun Zamenhof asimilis al homarana mondpercepto: lau Silfer, la Civito estas la sola kiu kapablas plenumi tiun identigan funkcion, nuntempe -- ghuste tial la Civito ekspansias, dum la tradicia esperanto-movado regresas. Tuta pagho de "Heroldo

de Esperanto" 2058 (11:2004), nun presata, estas dedichita al la simpozio, kun resumoj kaj eltirajhoj el la prelegoj. La kompletaj tekstoj aperos en la venontaj numeroj de "Literatura Foiro": plej unua, kiel eseo en LF 211 (oktobro 2004), tiu de Giorgio Silfer pri "Komunikado kaj reprezento". La tekstojn kolektos ankau sen. Oshlak, kun aliaj, en propre editorita libro, kiu povos roli kiel Aktoj de la Simpozio.

## ESPERANTOLOGIA FAKULTATO 2005 EN SVISLANDO

Kultura Centro Esperantista organizas la duan sesion de la Esperantologia Fakultato, en Chaudefono 2-6 kaj 9-13 augusto 2004. Eblas partopreni nur en unu el la du semajnoj, kvankam la programo ne ripetighas. Eblas ankau sekvi nur parton de la lekcioj. La Fakultato proponas kvar periodojn (po 1h30) chiutage, kun tri diversaj profesoroj: Duncan Charters (Usono), pri metodiko de la lingvoinstruado, kun specifa rilato al esperanto;Giorgio Silfer (Europo), pri elementoj de historio de la Esperanta parolkomunumo kaj ghia kulturo; Hiroyuki Usui (Japanio), pri interkulturaj problemoj en Esperantio. La Esperantologia Fakultato 2005 estos aparte interesa por chiu, kiu deziras instrui esperanton. KCE proponas ne nur la kursejon, sed ankau la loghigan servon, je moderaj prezoj. Por informoj: <kce.esperanto@bluewin.ch>

Saluton!

Mi kunsendas .pdf dosierujo kiu estas oficiala alvoko por cxeesti la
seminarion TAMEN (Teslicxa Alvoko Movigxi al Euxropa Nacieco) kiu
okazos komence da okobro 2004 en Respubliko Srpska, Bosnio kaj
Hercegovino.

Bonvolu vizitu: http://www.esperanto.rs.ba/tamen
Bonvolu kontaktu: tamen@esperanto.rs.ba

--
Igor MILOVANOVI?, prezidanto
Esperanto-Societo "Tesli?"

**<u>El la diplomlaboraj’oj de niaj gestudentoj</u>**

### Lago de Ohrid. La distrikto de Pogradec

Pogradec estas turisma urbo trovig'anta en la suda parto de la lago de Ohrid, 140 km sudoriente de Tirana. Trovig'anta je 700 m super la marnivelo kun saniga klimato g'i g'uas raran belecon.

La distrikto de Pogradec etendig'as en la regiono de abismoj kaj intermontaj kampoj de Sudorienta Albanio. La distrikto envorte havas surfacon je 725 km². La centro de la distrikto estas Pogradec, konstruita en la sudorienta bordo de la lago de Ohrid. Pogradec trovig'as apud la landlima punkto de Qafe Thane kaj la albanaj urboj de Makedonio: Struga kaj Ohrid. Pogradec trovig'as same la vojo Egnatia. kie oni projektis

konstrui au'tos'oseon. Elirante en la lagon de Ohrid Pogradec havas bonajn eblecojn por la disvolvig'ado de la blua turismo ( laga) kaj aliaj eblecojn sube traktotaj.

**La lago de Ohrid**

La lago de Ohrid estas lago je tektonika origino. Lokita en la intermonta kampo de Pogradecje alteco je 700 m super la marnivelo, la lago havas surfacon el 362.6 km² okupante la duan lokon en Albanio rilate la grandecon, same en la tuta Balkanio. La longeco de la bordoj de la lago estas 35-40 km dum la larg'eco 15-20 km . la bordoj de la lago estas g'enerale rektaj sen grandaj golfoj.

La lago de Ohrid nutrig'as de subakvaj fontoj alvenantaj de la lago de Prespa, trovig'anta en la alteco je 100 m pli ol la lago de Ohrid. El la lago de Ohrid elfluas la rivero de Nigra Drini , dum en g'i enfluas la torento de Çerrava. Rilate la profundecon el 287 m en g'ia maksimumo tiu lago konistigas la plej profundan lagon en Balkanio. La akvoj de la lago sin distingas pro alta travidebleco, je 22m . Sed la poluado povas damag'i ankau' tiun karaketrizaj'on.

Respubliko de Albanio posedas 30 km da laga bordolinio. La tau'gaj zonoj por turismo kaj konstruado estas de la hotelo "Turismo" de Pogradec g'is la vilag'o Tushemisht, je 6 km longeco. Tamen ankau' la bordo de Pogradec g'is la vilag'o Lin ( do entuta lagolinio) estas tau'ga por konstruado de hoteloj kaj turismecaj vilag'oj. Rilate la evoluon de la lago oni povas diri ke g'i estas iom komplika. La kavego sur kiu estas al akvoj de la lago estas malnova . La kavoj de la lago emas malaltig'i sekve de la cedado. Atestaj'o pri tio estas la formig'o de la duoninsulo de Lin , kiu antau'e estis insulo.

La lago de Ohrid konservas en g'iaj akvoj tre malnovan formon. G'i enhavas 19 specoj el kiuj 10 estas endemiaj. Tiuvidpunkte la lago estas konsiderata kiel natura monumento, pro fakto ke g'i estas relitoza. En la akvoj de la lago vivas la fis'o Koran kaj belus'ko la unuraj enmonde , same oni povas diri por la spong'o de Ohrid kaj kelkaj specoj de butakoj.

Preter la blua laga turismo la distrikto de Pogradec ofertas ankau' aliajn eblecojn. Tiel je 5 km for sude de Pogradec trovig'as la turisma punkto de drilon ( Volorek) kiu aktuale havas tri restoracioj je kapacito 170 sidlokoj. La distrikto de Pogradec havas same eblecojn por la disvolvig'o de verda turismo en la kas'tana arbaro je apudeco de la vilag'o Bishnice, ka. G'i havas ebelecojn por la disvolvig'ado de la fis'kaptado kaj c'asado. Tiu lasta okazs de au'gusto g'is marto en la zono c'irkau' la lago kaj c'irkau' la monah'ejo de Shen Marena. Rilate la flau'ra resurso kaj ligna kovraj'o la distrikto de Pogradec posedas entute 28370 ha da arbara surfaco kiu konistigas 39 % de la surfaco de la distrikto au' 3 % de la arbara surfaco de respubliko. El tiuj , 6710 ha estas protektitaj arbaroj kiujn oni devas gardi severe. Ludas rolon ankau' la foliarbaroj kun surfaco je 25 600 ha el kiuj 8780 ha estas fagarbaroj. La surfaco de pinarbaroj estas 2110 ha.

**La klimataj indikiloj**

La konsiderinda alteco super la marnivelo de pogradec kaj de la tuta distrikto konic'igas tie fres'an klimaton, mildan en somero kaj malvarman en vintro, neg'ofalojn, kiuj en kelkaj zonoj kiel en Mokra kau'zas ankau' vojblokig'on dumvintre.. menciante la averag'an komencan temeperaturon dum 30 a de junio je 20 ºC kiu finig'as je 29 a de au'gusto tiel dau'rigante 60 tagoj . La maskimala temperaturo en pogradec estas notita 36.6 ºC . La alia ekstermo, por komencig'o de frosto , mencias la daton 25 an de

novembro  g'is 24 a de marto. La absolutaj minimalaj temperaturoj tiuperiode estas -12.8ºC. La averag'a jara temperaturo estas 12ºC.Rilate la kvanton de sunumado por julio en pogradec , Tushemisht kaj la suda parto de la lago  g'i estas 325  horoj, dum por la plejparto de la lagolinio , por Lin kaj Mokra, la kvanto estas 300 horoj.Por la malvarma monato , januaro por Pogradec la kvanto estas 100 horoj , dum por la norda linio de la lago , Lin kaj Mokra  la kvanto estas 75 horoj. La zono c'irkau' la lago ricevas tutan jaron 2400 horoj da sunradioj.

Rilate la pluvofaloj la jara averag'a kvanto estas por Pogradec 765 mm dum la maksimumo 24 hora estas por Pogradec 77 mm. Rilate la aliaj indikiloj, ekz. por la vento por Pogradec la kvieteco de la vento en januaro estas 44 % dum en julio estas 51.7 % . Kutime la ventoj havas direkton de nordo al sudo , tamen estas ankau' lokaj ventoj  kiel ekz. la vento de lenie je direkto sudokcidenta. La temperaturo de la akvoj de la lago dum somero havas la valorojn 20-24ºC . La klimato havas pozitivajn efikojn por hipertonikoj, por tiuj suferantaj pro kormalsano kaj tiuj kiuj havas nervajn maltrankvilig'ojn.

**Pri la ekologia situacio**

Konsiderante la lagon kaj ties karaketron, en la kondic'oj kiam la regeneraciigajn eblecoj estas sufic'e malpliaj ol en la maro , oni devas zorgi por rigore protekti kaj gardi g'in. G'is nun fonto de poluado estas la mals'arg'ig'o de la nigraj akvoj  de la urbo de pogradec. Sed pli gravaj problemoj estas naskig'intaj  de industriaj poluaj'oj alvenintaj de la zono de Rug'a S'tono ( Guri i Kuq) kiuj damag'as la afu'non  kaj estas malaltigante la travideblecon de la lago. Tiuj problemoj devas kosniderato serioze kaj postulas certajn studojn por doni klarajn prognozojn.

**Pri la urbo de Pogradec, regionon envorte kaj arkeologiaj ric'aj'oj**

La regiono de Pogradec estis log'ata de la ilira gento de enkelejoj. Je la fino de VII jarcento antau' Kristo enkelejoj malfortig'is kaj la donitaj'oj aperigas la genton de desaretoj. La kastelo de la urbo de Pogradec komencis log'ati je V jarcento antau' Kristo. En la distrikto de Pogradec estas kelkaj bazilikoj en Lin, Tushemisht kaj Pogradec. Estas malkovritaj kelkaj monumentecaj tomboj en malsupra Selce. Estas malkovritaj kelkaj log'lokoj en Lin, Verdove, geshtenjas, ka. En la vilag'o Lin estas malkovritaj mozaikoj tre malnovaj.. La urbo de Pogradec havas hodiau' log'antaron  je 20 000 homoj. Pogradec estas ekspluatita ekde pratempo por turismaj celoj. Tiel la gepatroj de imperiestro Justiniano feriadis en la vilag'o Lin. En pli postaj periodoj, konkrete dum la komencig'o de XX jarcento multaj familioj el aliaj urboj kiel Elbasan, Korçe, kaj Tirana pasigis ilian feriojn c'e la lago de Ohrid. Ankau' hodiau' la familia turismo ludas gravan rolon en pogradec. Interne de la distrikto trovig'as la profunda areo de Mokra kiu konatig'as  pro g'ia notinda elmigrado.

**Edi Ceno**